


# TEA-BULTENO

4ª JARO | JUNIO 2001 | NUMERO 6



## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| 1 | V | Prikongresaj laboroj |
| **2** | **S** | |
| **3** | **D** | |
| 4 | L | |
| 5 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 6 | M | |
| 7 | Ĵ | |
| 8 | V | Prikongresaj laboroj |
| 9 | S | |
| **10** | **D** | |
| 11 | L | |
| 12 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 13 | M | |
| 14 | Ĵ | |
| 15 | V | Prikongresaj laboroj |
| 16 | S | |
| **17** | **D** | **Di-servo en Udine** |
| 18 | L | |
| 19 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 20 | M | |
| 21 | Ĵ | |
| 22 | V | Prikongresaj laboroj |
| 23 | S | |
| **24** | **D** | |
| 25 | L | |
| 26 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 27 | M | |
| 28 | Ĵ | |
| 29 | V | Prikongresaj laboroj |
| 30 | S | |

## *La redakcio informas*

Kara Leganto!

Post du monatoj komenciĝos la 70ª Itala Kongreso de Esperanto kaj vi ja bone povas imagi, kiom da laboro ĝi postulis kaj postulas kaj postulados de tiu manpleno da homoj, ĝin organizantaj. Niaj fortoj, energioj, pensoj kaj tempo estas dediĉataj nur al ĝi kaj pri nenio alia ni povas okupiĝi. Eĉ pretigo de du-paĝa, modesta asocia cirkulero estas en ĉi tiu momento tempo-raba, tial la junia numero estos la lasta kiun vi ricevos dumsomere.

TEA-BULTENO reaperos en septembro - se ni postvivos la kongreson!!! Fidante je via amika komprenemo, samideane ni ĝisrevidas vin, kun la espero havi vin ĉiujn kiel gastojn kaj - laŭ viaj povo kaj volo - helpantojn dum la nacia kunveno.

Ni rekomendas vin viziti nian prikongresan paĝaron ĉe http://members.xoom.it/verdastelo aŭ http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html



## Librokatalogo de UEA Montrofenestro de la Esperanto-kulturo

La impona nombro de 4387 titoloj troviĝas en la ĵus aperinta 189-paĝa katalogo de la Libroservo de UEA. Pli ol 4100 el ili estas libroj, dum la resto konsistas el diskoj, kasedoj, vidbendoj, insignoj kaj aliaj varoj. La nova katalogo, titolita simple ESPERANTO-KATALOGO kaj eldonita en 7500 ekzempleroj, havas 40% pli da titoloj ol la antaŭa, aperinta en 1994, kiu havis 3150 erojn. Ĝi ne estas nura prezlisto, sed la varoj estas koncize priskribitaj, krom se la titolo mem jam sufiĉas.

La katalogo estas dividita en 32 fakojn. Ĝian uzon plifaciligas ankaŭ indekso de la aŭtoroj, entute 375, kiuj estas reprezentataj per pluraj titoloj. Al la informa valoro kontribuas ankaŭ multaj reklamoj de Esperanto-eldonejoj.

Plenkolora kovrila foto pri la libroserva butiko en la Centra Oficejo faras el ĝi tre allogan eldonaĵon, kiu certe ne povos manki en iu ajn ekspozicio pri Esperanto. Apud la Jarlibro de UEA kaj la adresaro de PASPORTA SERVO de TEJO, ĝi montras la vivantecon de Esperanto kaj ĝia movado.

La katalogo estas sendita senpage al la dumvivaj membroj kaj delegitoj de UEA, al la klientoj de la Libroservo kaj al la Membroj-Abonantoj en pagipovaj landoj. Poste ĝin ricevos kaj la novaj klientoj kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ĉi-jare aliĝos al UEA en la kategorio Membro-Abonanto. Eblas ankaŭ ĝin aĉeti. Ĝia prezo estas 4,50 eŭroj (plus afranko kaj, por EU-civitanoj, 6%-a imposto).

Se oni samtempe aĉetas minimume tri ekzemplerojn, la prezo estas 3,00 €. Tiuj pagantaj la plenan prezon de 4,50 €, ricevos ĝin (escepte de sendokostoj) lige kun sia unua mendo ĉe la Libroservo de UEA. Tiu favoraĵo validos tri monatojn ekde la aĉeto de la katalogo.

## Temo de la Fortaleza UK

La Estraro de UEA decidis dediĉi la 87an Universalan Kongreson de Esperanto, okazontan de la 3a ĝis la 9a de aŭgusto 2002 en Fortalezo, Brazilo, al **ekologia turismo**. Fakte la jaro 2002 estos Internacia Jaro de Ekologia Turismo, tiel ke ankaŭ tiam la UK daŭrigos la tradicion kontribui al la aktuala temajaro aŭ jardeko de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. Jen la titolo:

Diverseco: ŝanco, ne minaco.

Per tio la Estraro de UEA akcentas la neceson kompreni la ekologian turismon pli vaste ol nur en rilato al la naturo. Same necesa kiel konservo de la natura diverseco estas tiu de kultura diverseco. Fundamenta aspekto de la kultura diverseco estas la diverseco de lingvoj.

*Informis CO de UEA*

## Mallonge pri...

⇨**Ekumenaj kongresoj** - Inter la 14a-21a de julio 2001 okazos la 15a Ekumena Kongreso kaj samtempe la 5a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro. La du aranĝoj havos tute saman kongresejon, sed ofte apartan programon. La aranĝo estas bona eblo havi interlandajn, interreligiajn rilatojn per Esperanto. Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe:

Marija Belosevič - Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb
Rete: mbelosev@public.srce.hr

⇨**Festivalo de videofilmoj**

La 5a Festivalo de Videofilmoj okazos la 29an de septembro 2001 en Maribor, Slovenio. Eblas partopreni per filmoj en du kategorioj: arta kaj/aŭ dokumenta filmoj. La artaj filmoj ne daŭru pli longe ol 10 minutojn, la dokumentaj ne pli ol 15 minutojn. Informoj kaj aliĝoj ĉe:

Esperanto-Societo - Besednjakova 1, SI-2000 Maribor

⇨**Medicinstudantoj serĉataj!**

Por interŝanĝi ideojn pri projekto inter gestudantoj de medicino pere de Esperanto, oni bezonas kontakti geesperantistajn medicinstudantojn el malsimilaj landoj.
Interesatoj kontaktu:

Sandra Burgues Roca, Fakultato de Medicino
Avda. Gral. Flores 2125, UY-11800 Montevideo
Rete: sburgues@fmed.edu.uy

⇨**14a Internacia Junulara Seminario**

Okazas inter 13a-19a de julio en Szombathely, Hungario. La temo de la ĉi- jara IJS estas

**Muziko kiel internacia lingvo**

La organiza teamo, la temo kaj kompreneble la partoprenontoj mem estas garantio de vere bona, amuziga, aktive ripoziga etoso dum la plej tradicia kaj plej granda mezeŭropa junulara aranĝo. Ankaŭ ĉijare ne mankos surprizoj, ekskursoj, iom da "tradicia akvumado" kaj dumnokta dancado ĝis la "preskaŭ-morto".

Ret-aliĝilo ĉe: http://www.esperanto.hu/hej
En preparo karavano al Zagreba UK. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: Hungara Esperanto-Junularo
Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario
Rete: hej@math.bme.hu

⇨**Rejkjaviko elektis la anglan**

Pro kreskanta premo de la angla lingvo, la 270.000 loĝantoj de Islando ege "bone" ĝin parolas, precipe la plej junaj. Sendube pro tio, multaj islandanoj studas eksterlande. Lastatempe la registaro timas, ke studentoj ne plu revenu, post studado, al vulkana kaj malvarma Islando, kio konsekvence timigas ankaŭ la lokajn entreprenistojn. "Studi eksterlande postuniversitate estas bona afero. Nur ke ili hejmen revenu" diras prof. *Bjarnadottir* de la Rejkjavika Universitato. "Ni konkurencas kun la resto de la mondo por doni al homoj la ŝancon plue vivadi en Islando" substrekas prof. *Jonsdottir*. Rejkjavika Universitato, la sesa plej grava en la insulo, nun trovis solvon: oni instruos anglalingve al studentoj el Islando kaj aliaj landoj! "Ni estas meze de Atlantiko kaj havas malfermitajn pordojn al Usono, Kanado kaj Eŭropo" aldonas prof. *Jonsdottir*. Sed ĉu Rejkjavika Universitato havas malfermitajn pordojn al islandanoj kiuj deziras studi Islande?

*Informis Ndeba Ugushi rete: ndebaugushi@hotmail.com*

## 2750-JARA SAMARKANDO

*Anatoli Ionesov*, direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando (Uzbekio) invitas al partopreno en letervespero dediĉita al la 10-jariĝo de sendependeca proklamo de Uzbekistano kaj okazonta venontaŭguste. La samarkandaj samideanoj jam aktiviĝis por tion organizi kaj alvokas ĉiujn geamikojn tra la mondo sendi ĉiuspecajn, tiutemajn materialojn.

Bonvenaj kaj atendataj estas: salutleteroj, vojaĝimpresoj, nacilingvaj gazetartikoloj, libroj, turismaj broŝuroj, kantoj, poemoj, dokumentoj, fotoj, desegnaĵoj ktp **pri Uzbekistano** - fakte ĉio ajn pri la temo (eĉ fotoj de propralandaj vendejoj/restoracioj kc havantaj nomon "Samarkando", "Buhhara" ks!).

Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala muzea ekspozicio. La plej interesajn materialojn oni publikigos ankaŭ en la loka nacilingva gazetaro. Krome, la plej aktivaj kontribuintoj ricevos uzbekiajn memoraĵojn, la noveldonitan esperantlingvan broŝuron SAMARKANDO POR TURISTOJ kaj la unuan uzbeklingvan Esperantan lernolibron (kun du vortaretoj kaj konversaci-libreto utilaj ankaŭ por eksterlandanoj!).

Bonvolu adresi ĉion al:
Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76,
UZ-703000 Samarkando, Respubliko Uzbekistano.
Retadreso: peacetur@samarkand.uz
Interreto: http://www.friends-partners.org/~ccsi/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm

---

**Ridanguleto** - La edzino forkuras frumatene kaj hejmenrevenas malfruvespere. La malpacienciĝinta edzo rigardas ŝin kun sulkiĝintaj brovoj kaj demandas: "Kien vi iris la tutan tagon, karegino?" "Ho, mi estis ĉe la instituto de beleco, karega" "Ĉu vere? Kaj certe ĝi estis fermita..." li substrekis post fulma trarigardo de ŝia vizaĝo.

Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349